

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, POSTBUS 100, MECHELEN

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks  
Een en twintigste jaarg.  
Nummer 6 (238)  
JUNI 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P. M. Mahesoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 100 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## Beneluksa Esperanto-Kongreso, Lieĝo, Pentekosto 1954-a

### LASTA ALVOKO!

La Loka Kongresa Komitato faris al mi la honoron prezenti min kiel Kongresprezidanton kaj FL.L.E. kaj R.B.L.E. en sia lasta kunsido de la Belga Centra Komitato Esperantista konfirmis tiun nomigon.

Mi estas tre dankema pro tiu konfidoj kaj mi kompreneble solene promesas plenumi mian funkcion tiel bone kiel eble.

Mi tamen kredas ke estas mia devo fari lastan alvokon, tiel ke la nombro da aligoj ĝisnuna ne ŝajnas al mi tiel granda kiel ĝi devus esti: apenaŭ pli ol 125 pagis sian aligotizon kaj nur proksimume 80, ĉirkaŭ la mezo de majo, mendis hotelon, manĝojn k.t.p.

La „maldiligentemo“ de la Esperantistoj estas ja konata, sed mi kredas ke estas mia nepra devo instigi, kelkajn tagojn antaŭ la „evento“, vin ĉiujn al tuja enskribo kaj pago de la neseca sumo: vi tiel nepre helpas la komitatdajn membrojn de la Loka Kongresa Komitato kaj pruvas ke vi taksas iliajn laboron kaj malavaraĵoj klopodoj - altaj!

Tre ofte la indiferenteco de la t.n. organizitaj Esperantistoj mirigis kaj konsternis min; estas kvazaŭ eblus ke asocioj bezonas nur fantomajn membrojn, kiuj ja pagas sian kotizon — kaj jen ĉio; estas kvazaŭ la vigleco de la asocia vivo ne interesas la rektajn koncertatojn kaj neniel nepre postulus ĉies kunlaboron, ĉies *ĉeeston!*

Karaj membroj, komprenu vian devon kaj ja partoprenu la kongreson organizitan por vi, vian kongreson!

Tiu kongreso kontribuos al la efektivo de via idealo, la idealo de Zamenhof kaj de ĉiu pac-amanto! Ĉu tio do ne indas la penon, malgrandan penon kompare al tiu de la Majstro kaj de la pioniroj, kiuj tre ofte oferis sian tutan vivon kaj multe pli?

Sur la sama flanko de la pago, vi ree trovu la programon kaj diversaj utilajn indikojn.

Ĝis revido en Lieĝo!

D-ro T. van Gindertaelen.

KONGRESPREZIDANTO: D-ro T. VAN GINDERTAELEN

### — LOKA KONGRESO KOMITATO —

Prezidanto: J. M. P. DESONAY.

Vic-prezidantoj: D-ro T. VAN GINDERTAELEN kaj F. WEEKE.

Sekretario: J. Soyeur, rue du Chêne, 91, Seraing.

Kasistino: S-ino J. Plyson (p.ĉ.k. no, 1006.30).

Festkomisaro: M. Guyot.

Propaganda Fakoj: J. Koene kaj J. Van der Meersch.

### — EJOJ —

Akceptejoj: Oficejo de Turismo, ĉe la elirejo de la stacidomo LIEGE-GUILLEMINS.

Kunsidoj: Hotelo VENITIEN, Place de la République Française (Teatro),

Vesperfesto: Hotelo VENITIEN.

Festeno: Vaxelaire-Claes, Place Maréchal Foch (100 m. de VENITIEN).

Balo: Dancejo „BEAULIEU“, Place St-Paul (apud la Katedralo).

Diservo por Katolikoj: Preĝejo St Sacrement, Boulevard d'Avroy, 132.

Lunda Tagmanĝo: Societo „L'HARMONIE“, 6, Avenue Delchambre, HUY.

### — PROGRAMO —

Sabato, 5-an de junio 1954:

13.39 h. Malfermo de la akceptejoj, informejo kaj transdono de la kongresaj dokumentoj.

16 h. Jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto.

17 h. Gvidata promenado tra la urbo.

17 h. Laborkunsido R.B.L.E. — Ligestrarkunsido de FL.L.E.

29 h. Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluksa Kongreso; la akceptejoj trans, lokigas al Hotelo Vénitien.

21 h. Festvespero.

Dimanĉon 6-an de junio:

9-a h. Diservo por Katolikoj (preĝejo St Sacrement, boulevard d' Avroy, no 132.) kun prediko de Abato MULLER, el St-Vith.

9.30 h. Malfermo de la akceptejoj. — Fermo je 11 h. 30.

10 h. Solena kunsido R.B.L.E.

10 h. Jarkunsido Flandra Ligo.

12 h. Akcepto en la Urbdomo (Place du Marché).

13 h. Oficiala Fotografado.

13.30 Komuna Tagmanĝo (Magazeno VAXELAIRE-CLAES, Pl. Maréchal Foch).

15.30 Promenado tra la urbo. Vizito de muzeoj.

20 h. 30 Balo en „Beaulieu“, place St-Paul.

Jarkunsido de Flandra Esperanto-Instituto en „Hotelo Vénitien“.

Lundon 7-an de junio.

9 h. Enŝipiĝo en boato „André-Lulu“, ĉe la ponto „Passerelle“. Vojaĝo al HUY, laŭ Ougrée, Seraing, Val-St-Lambert, Amay. Alveno en Huy ĉ. 12 h. 45.

13 h. Komuna tagmanĝo en salono de la societo „L'Harmonie“.

14 h. Vizito de la turisma urbo Huy.

ĉ. 17 h. Reiro fervoje al Lieĝo. — Disiro.

L.K.K.

## PRI JUGOSLAVAJ STUDENTOJ

En 1938-39 estis en Jugo-Slavujo 17.700 studentoj en 23 fakultatoj; en 1950-51 la nombro atingis 60.000 en 56 fakultatoj. Tiel rapida kresko kaŭzis la troplenecon de la aŭditorioj kaj de la student-loĝejoj; tiel la studonivelo ofte malboniĝis. La egan multnombregon de studentoj provokis la fakto, ke post la milito la bezono de specialistoj ege sentiĝis; tial abolicigi la universitataj impostoj kaj ekestis vasta sistemo de ŝtatsubvencioj. En 1951 pliseverigis la ekzamenoj kaj la subvencioj nur estis donitaj laŭ la studentaj bezonoj. Nun preskaŭ ĉiu studentoj devas pro ekonomiaj kialoj eble plej baldaŭ fine la studojn; antaŭe tiu-ĉi deziro ne estis tro granda, ĉar ofte la subvencio superis la salajron, kiun oni gajnas post la doktorigo.

Nun nur malmultaj studentoj ricevas la tutan subvencion. Tamen la plimulto de la studentoj estas subvenciataj, ĉar iliaj gepatroj estas laboristoj aŭ funkciuloj en publika servo (90%), kiuj ricevas po filo, registrita en elementa aŭ mezgrada lernejo, gimnazio aŭ universitato, specialan aldonon krom la subvencio. Preskaŭ 25.000 de la 60.000 studentoj ricevas tiun subvencion, kiu sumiĝas en totalo je 3 Milionoj da dolaroj. La plej malbonan ekonomian situacion havas la filoj de la malriĉaj terkulturistoj; multaj de ili loĝas malproksime de hejmo, sen sufiĉa kaj daŭra helpo de la gepatroj. Nur malmultaj de ili ricevas subvencion. En la kadro de la studenta organizo estis fondita helpservo per pruntodonoj, precipe de kiuj jam finis la studojn. Multaj studentoj senpage ricevas la loĝadon kaj manĝadon kaj la eblon kromlabori.

La jugoslavaj studentoj malmulte vojaĝas dum la litertempo, ĉar malgraŭ la malaltigitaj vagonar-tarifoj, la kostoj ankoraŭ estas tro altaj. La studentoj el la kamparo iras hejmen kaj laboras, multaj kiel sezonlaboristo por akiri la necesan monon por la vestaĵoj kaj eble restadon ĉe la marbordo. Generale la studentoj ne vojaĝas bicikle, ĉar escepte en Slovenujo, la stratoj malebligas tion kaj la „aŭtostop“ estas malpermesata. La studento-organizo havas specialan libertempan servon kun vojaĝ-organizo kaj malmultekostaj loĝejoj.

En 1949 pli ol 400 studentaj pasigis la feriojn je ŝtatokosto, en 1950 pli ol 6000 pagis 1000 dinarojn por 25 ferioj (2000 liroj) kaj la diferencon 16 milionojn da dinaroj pagis la stato. Ekzistas speciala medicina servo por la studentoj, kontraŭ pago de 50 dinaroj (100 liroj) po studoperiodo; en Belgrado estas 10 poliklinikoj kaj 3 sanatorioj.

Prizorgita de Drago Kratj, de la Internacia Asocioj de la Esperantistajjur-nalistoj.

(Laŭ la itala artikolo en NOTIZIARIO INTERNAZIONALE - TORINO: Debaets Etienne).

## ORATORA KONKURSO-DEBATO POR GEJUNULOJ EN HARLEMO

La Estraro de UEA ĵus decidis, ke la temo de la temo de la ĉi-jara Oratora Konkursuro, okazonta dum la sekvanta U.K. en Harlemo, estos: „**La Rolo de la Internacia Lingvo por la Spirita Unueco de la Homaro**“. La subtitolo estas: „Ĉu la diverseco de lingvoj malhelpas la spiritan unuecon de la homaro kaj ĉu la Internacia Lingvo forigas — se jes, ĝis kiu grado — tiujn malhelpojn?“

La Estraro decidis okazigi la ĉi-jaran Oratoran Konkursuron en formo de debato. La temo estas elektita konforme al tiu nova formo: oni povas esprimi plej diversajn opiniojn koncerne la gravegan demandon pri la rolo de la lingvo por la unueco de la homaro.

La debaton povas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj. Ili estas petataj anonci sin kiel eble plej baldaŭ al la Loka Kongresa Komitato, Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando. La lasta dato por sin anonci estas

la 31-a de Julio 1954. Pri la tago kaj horo de la debato aperos informo en la kongresa programo.

La debato okazos laŭ la principoj de la Regularo pri la Oratoraj Konkursuroj. La konkursantoj devas paroli libere, sed rajtas uzi memorigajn notojn. La tempo-daŭro de ĉiu parolado estos proksimume 10 min. La sama oratoro rajtos paroli, se necese, plian fojon por respondi al eventuale esprimitaj kontraŭaj opinioj. Pri tio decidis la Komisiono laŭ la peto de la konkurna konkursanto. Post la fermo de la debato la Komisiono tuj kunsidos kaj proklamos la 3 gajnintojn. Ili ricevos diplomojn kaj libropremiojn.

La Estraro de UEA esprimas la deziron, ke multaj gejunuloj el diversaj landoj partoprenu tiun interesan Debaton kaj kontribuu tiamaniere al pli bona kompreno pri la rolo de la Internacia Lingvo en la hodiaŭa mondo.



## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

N-70 8

OFICIALA KOMUNIKO

Majon 1954

### L.K.K. NE PLU AKCEPTAS ALIĜOJN!

**Adreso:** Poŝtfako 140, Haarlem.

**Banko:** Rotterdamsche Bank, Haarlem.

**Poŝtgirkonto:** 604997.

**Pagoj:** Por ĉekoj el eksterlando L.K.K. devas pagi makleron al la nederlanda banko (kutime fl. 0.50 aŭ fl. 0.90 depemde de tio, ĉu estas korespondado). Bonvolu aldoni tioman sumon al pagoj.

Nepre sendu la mendilon kaj pagon al la sama instanco, ekzemple al Peranto en via lando.

**Loĝado:** La mendoj por litoj alvenas relative malrapide. En junio la Loĝiga Servo malmendos ĉiujn litojn kiuj eventuale ĝis tiam ne estos rezervitaj kaj poste ne plu okupos sin pri loĝigado. La Loĝiga Servo meze de majo sendos al ĉiu mendinto avizilon kun la adreso de la loĝejo. Tiu avizilo estas ankaŭ legitimilo, kiun oni montru je alveno en la loĝejo.

**Oficiala Programo:** La programo de la kongreso jam estas aprobita de la Estraro de U.E.A. Tial L.K.K. ne plu povas konsideri petojn pri salonoj por kunvenoj aŭ proponojn por novaj eroj.

**Kongresa Libro:** Tiu libro kun plena programo, multaj informoj kaj listo de aliĝintoj, estos preta en komenco de junio kaj L.K.K. tuj sendos ĝin al ĉiu aliĝinto. En okazo de nericevo bonvolu vin turni al L.K.K.

**Statistiko (ĝis 30a de apr.):** Algerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 10, Balgujo 52, Brazilo 3, Britujo 277, Danujo 71, Finnujo 50, Francujo 236, Germanujo 260, Hispanujo 12, Indonezio 1, Irlando 5, Italujo 79, Japanujo 1, Jugoslavio 96, Kanado 4, Madejro 1, Maroko 1, Meksikio 2, Nederlando 614, Norvegujo 108, Novzelando 12, Portugalujo 7, Svedujo 271, Svislando 37, Turkujo 2, Usono 11. Sumo (el 28 landoj) 2226. (Multaj aliĝoj ankoraŭ ne estas listigitaj pro teknikaj kaŭzoj).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario.

# LA STUDANTO

Jen la ĝustaj formoj de

## Ekzerco 16 A:

1: naskiĝis; demandis. 2: naskis (ne naskiĝis, ĉar naski jam estas transitiva verbo kun la signifo: produkti idon (parolante pri mi)); naskigo (parolante pri virseksulo) = okazigi la naskon de ido; do: vitino naskas infanon kaj viro naskigas infanon); komenciĝis (komenci estas transitiva verbo: la militemaj homoj komencas militon; la milito

pro uzata por montri motivon) timo pro la operacio? 5: Laŭ peto ... al li ... 6: ... miris pro (ankaŭ: pri) tiu alporto kaj konsilis al mi ... 7: Laŭ la kuracisto ... el sia lito. 8: ... diris al ... suferas pro (ankaŭ laŭ ofta Zamenhofa ekzemplo: de. Vidu la interkrampojn klarigon ĉe frazo 4-a).

## NOVAJ EKZERCOJ

### Ekzerco 17 A:

Kie estas streko, tien metu la finaĵojn -e, -a, -aj, -an aŭ -ajn:

## MENDU ĈE

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam

Flandra Esperantisto Instituto, Blankenbergse Stwg 72, Brugge (per 3268.51)

	bind.	gld	Fr
Ĉe la Sanktaj Akvoj (de Heer), svisa romano	bind.	6,60	75,—
La baptado de caro Vladimir (Havlicek)	"	6,25	
Pensoj de Zamenhof (citaĵoj en kvin lingvoj)	"	0,60	12,—
Fabiola (Wisemann)		4,50	
id	bind.		80,—
Infanoj en Torento (Engholm) du volumoj kune		4,—	55,—
La Normandaj Rakontoj (Maupassant) ilustrita	bind.	12,—	160,—
Ataĵoj kontraŭ ĝardenplantoj, kun multaj bildoj	"	11,—	145,—
Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj, " " " "	"	7,90	105,—
La Ekspedicio Kon-Tiki, " " " "	"	13,—	175,—
Burĝonoj (Setala), Infanfotografioj kun poemoj	"	8,50	105,—
Helsinki, lumo kaj ombro (fotoalbumo)	"		130,—
Palaco de danĝero (Wagnalls)	"	3,50	48,—
La Verda koro (Baghy)	"	2,25	25,—
La teatra korbo (Baghy)	"	1,50	20,—
Du amosentaj noveloj (Storm, Escherich)	"	1,95	
La mondon al ni (Kilian)	"	1,20	16,—
La knaboj de la Paulo-Strato (Molnar)	"	1,20	16,—
Ferioj kun la morto (Linqvist), detektiva romano	"	2,25	30,—
Du Majtro-Noveloj (Storm)	bind.	2,10	25,—
La Virineto en bluo (Stuttard)	"	2,35	30,—
La Homaj rasoj de la mondo (Nordenstreng), ilustrita	"	3,40	40,—
La Esperanto movado (Isbrucker, Stop Bowits)	"	2,—	
Post la kurso (de Bruin, Faulhaber)	"	2,—	

komenciĝas); ekrespondis. 3: eksplodis (la militemuloj eksplodigis la militon; la milito eksplodis); naskiĝo; daŭrigis. 4: dubas; naskiĝo; kaŭzis; malpacon (ankaŭ: malpaciĝon). 5: malpaciĝis (pli bona formo ĉi tie ol; malpacis); informiĝis (informi = doni informojn; informiĝi = peti aŭ ricevi informojn). 6: naskiĝintaj; volis dorloti; maldorlotis. 7: ĵaluziĝis (ankaŭ: ĵaluzis = estis ĵaluzaj); ŝanĝiĝis. 8: pliaĝiĝis; plisaĝiĝis; trijariĝinte; enlitiĝis.

Jen la ĝustaj prepozicioj de

## Ekzerco 15 B:

1: Mi iris al (oni forgesis meti ĉi tien streketon) paciento en malsanulejo proksime al la urbdomo, sed malproksime de nia hejmo. 2: Li suferis pro hepatmalsano, sed esperis pri ... 3: ... pensis pri (ne: al) ... pro malforteco ... insistis pri (ne: al! Oni insistas ĉe iu aŭ al iu pri io); de tago al tago ... 4: Ĉu „ĉiu“ estis komposteraro! pro (ankaŭ: de kiu prepozicio estas uzata por montri metaforan devenon, la kaŭzon distinge de la prep-

1: S-ro Elegantulo denov— deziras aĉeti nov— ĉapelon. 2: Li— nun— ankoraŭ estas bon— kaj bel—, sed li estas ŝanĝem—. 3: Li ne tre plu ŝatas ĉapelon surhavat— pli long— ol du monatojn. 4: Surhavint— ĉapelon unu monaton, li sciol— rigardas atent— la allog— montrejojn de ĉapelmagazenoj. 5: Lutag— preterpasant— ti— magazeno, li rimarkas subit— ĉapelon pli allog—, pli elegant— ol li la propr—. 6: Li eniras la butikon plen— de klientoj. 7: Vendisto ne okupit— montras sin helpem— kaj demandas, kion la nov— kliento deziras. 8: „Nov— ĉapelon, s-ro vendisto,“ li diras, „ti—, ki— estas ekspozat— en la montrejo.“ 9: Li metas si— nun— mezur— komparot— sur malplen— lokon de magazentablo. 10: La servem— vendisto apud— dismetas grand— amason de ĉapeloj vendot—. 11: S-ro E. provas mult—, sed juĝas plurtro hel—, ali— tro malhel—, tro larĝ— aŭ tro prem—. 12: Provint— ĉiujn kaj reprovint— kelk—, s-ro E. fin— ĝoj— ekkrias:

„Nun mi havas la ĉapelon plej agrabl—konvenant— al mi— strangform— kapo!“ 13: Ridetant— la vendisto rimarkigis: „Gi estas vi— propr—, sinjoro!“

## Ekzerco 16 B:

Kie estas streko, tien metu la ĝustan konjunkcion aŭ subjunkcion (= voegwoord) aŭ prepozicion (= voorzetsel):

1: S-ro Promenulo — lia edzino iris tra la strato. 2: Amiko lia — sia edzino sidis sur teraso de kafejo. 3: — la amiko ne estus vokinta, s-ro P. — lia edzino ne estus rimarkintaj ilin. 4: — s-ro P. aŭdis la voĉon de sia amiko, li — sia edzino iris al la amiko — lia edzino. 5: La amiko demandis ilin, — ili ŝatus trinki teon — kafon — ion pli freŝan. 6: Li respondis, — ili volas trinki — unu — alian, — ili preferas promeni. 7: La amiko proponis, — ili promenu ĉirkaŭ la tablo — tamen trinku ion—.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu antaŭ la 20-a de junio 1954-a al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG, Waltaweg 3, TJERKWERD (Frislando), Nederlando.

## Pri J. B.

Ni artikoleto pri la konata nun silenta Esperantista aŭtoro J.B. havis la neatenditan efikon, ke la redakcio de Svisa Espero ricevis leteron de la aludita, kiu skribis al ni ke li legis kun emocio la sciigon. „Jen tio pravas, ke one ne tute forgesas pri la malnova kunbatalanto“. Certe ni ne forgesis! Kiel dankon li sendis al ni poemon, kiu pruvu „ke J.B. ne tute malaktiviĝis“. Ni publikigas ĝin sube kaj estas tre feliĉaj ke ni povas fari tion.

## PIRAMIDOJ KAJ KANALOJ

Julio Baghy

Piramidoj kaj kanaloj

ŝviton sorbas, penon urĝas;

laborestroj sklavojn skurĝas

vivojn glutas la bataloj...

KLIO notas en analoj:

„Supre siblas ureuso,

sube veas sklavkorpuso,

milionoj da damnitaj

kaj kreigigas gloraj mitoj,

piramidoj kaj kanaloj.“

Piramidoj kaj kanaloj;

inter ili Vivo bruas,

ondas, tajdas kaj detruas

dum jarmiloj en bataloj...

KLIO notas en analoj:

„Supro reĝe regi ŝajnas,

subo perdas, eĉ se gajnas;

supro planas, subo kreas,

sed...kun mitoj ja pereas

piramidoj kaj kanaloj.“

Notoj: ureuso = serpento egipta, simbolo de la faraona potenco.

KLIO = Muzo de la Historio en la greka mitologio. Analo = jarkroniko.



**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
 Penningm.: P. M. Mabe-soone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. postrek. 34563.  
 Boekendienst: S. Mabe-soone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.  
 Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29 Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22975.

**KOMUNIKOJ DE L.K.K.****URGA ALVOKO**

Dum la kongressemajno aperos ĉiutaga kongresgazeto, tute en Esperanto! Ni bezonas kelkajn spertulojn por traduki „telex“-novajojn, ktp. kaj kiuj povas desegni karikaturon por tiu gazeto?

Tro malmultaj helpantoj disponigis sin por tajpado, raportado, ktp. Ni disponigas 10 skribmaŝinojn, kiuj atendas siajn portempajn gemastrojn. La laboro povas esti farata en la kongresejo. L.K.K. insiste petas tiujn, kiuj estas pretaj plifaciligi la supre menciitajn taskojn per kelkhora deĵoro, tuj informi la ĝen. sekr. de L.E.E.N.

Ni krome bezonas ankoraŭ kelkajn gvidantojn por la ekskurso je 5/8, prefere personojn, kiuj flue parolas Esperanton kaj konas la vizitotajn regionojn kaj lokojn.

L.K.K. petas gekongresanojn, kiuj disponas pri regionaj kostumoj, ekz. frisaj, grönigenaj, porti ilin en la interkonatiĝa vespero kaj dum la kongresa balo.

Cu inter viaj gekonatoj estas filatelistoj? Informu ilin, ke okaze de la kongreso funkcios speciala poŝtoŝeĵo, kie oni stampos ĉiujn poŝtajojn per ornama kongresstampo kaj ke en la kongresejo estos aĉeteblaj „unuataĝaj“ kovertoj!

**INLICHTINGEN VOOR CONGRES-MEDEWERKERS**

Het meeste werk moet verzet worden op Zaterdag 31/7, vooral na de morgenuren, omdat dan de grote stroom van congressisten verwerkt moet worden, maar 's morgens om 9 uur moeten we direct al kunnen beschikken over een uitgebreide staf van medewerkers, die we voornamelijk uit Haarlem en Amsterdam zullen moeten recruter. Toch hebben we dan nog meer helpers en reserves nodig, temeer omdat de meeste Haarlemmers en enkele Amsterdammers ook de dagen voor het congres al ingeschakeld zijn.

Willen congressisten-helpers uit andere plaatsen, die zich al als vrijwilligers hebben opgegeven, ons zo mogelijk reeds nu even doen weten, hoe laat of liever hoe vroeg ze 31/7 beschikbaar zijn, om zo nodig direct aan de slag te gaan. Zonder deze gegevens

is het vrijwel onmogelijk, een dienstrooster te maken.

Als regel is het congresgebouw dagelijks geopend van 8—18 uur. Tijdens de officiële opening op 1/8 en de excursies op 5/8 is het gebouw gesloten. Gedurende het gehele congres functioneren slechts de boekendienst, persdienst, ansichtenverkoop, uitreiking poste restante, postkantoor, alg. inlichtingendienst, „rendez-vous“-loket, zaalcontroles en enkele kleinere diensten; de eerste vier dagen bovendien de loketten voor bankzaken, excursies en schouwburgvoorstellingen en de eerste twee dagen nog de kongreskas, uitreiking van kongresbescheiden en huisvesting.

**INSTRUCTIES**

Men bestudere van te voren het congresboek. Dat voorkomt overbodige vragen!

Medewerkers moeten als congressist ingeschreven zijn en moeten zich dus eerst zelf melden bij de kongreskas, enz. alvorens als helpers te kunnen fungeren. Wij streven naar een max. dienstdag van 2 uren.

Iedere helper dient in het bezit te zijn van blocnote en potlood. Medewerkers melden zich, na hun kongresbescheiden in ontvangst genomen te hebben, bij de centraalpost (L.K.K.) waar zij het dienstrooster kunnen raadplegen en zo nodig nadere instructies ontvangen. Bij plotse linge verandering is ruiling met een collega mogelijk, mits daarvan opgave wordt gedaan aan de centraalpost.

Iedere helper dient te weten, waar de verschillende diensten ondergebracht zijn, behoort het „programma van de dag“ te kennen (men raadplege steeds het bord voor event. wijzigingen en aanvullingen!), moet op de hoogte zijn van de ligging van de kongreslocaliteiten in en buiten het congresgebouw en weten, hoe deze te bereiken zijn.

Precies op de aangegeven tijd neemt U het werk van Uw voorganger over en ontvangt een band, die U als medewerker kenbaar maakt. Neem vooraf even een kijkje bij Uw voorganger, die U zonodig in kan werken en U event. aanwijzingen kan geven.

Is men onder lunchtijd ingeschakeld, dan

doet men verstandig, een lunchpakketje mee te nemen.

Men verlate zijn post nooit! Bij moeilijkheden wende men zich tot een van de leden van het L.K.K.

La venontaj elsendoj pri Esperanto kaj la 39-a Universala Kongreso de Esperanto okazos mardon, la 8—6 kaj mardon la 6—7, posttagmeze 17.50—18.00 h. pere de radio A.V.R.O.

Krome, V.P.R.O.-elsendo: vendredon 13.7 de 19.30—19.45 h. Temo: E, en het Wereldcongres van Esperantisten te Haarlem.

Estas ĝojige, ke AVRO kaj VPRO montras interesigon pri E. kaj konsentis kelkminutan elsendon, sed plorige estas ke la E-istoj ne reagis. S-ro S. S. De Jong, gvidanto de la Radio-Servo ofte skribis: „La E-istoj havas la elsendojn, kiujn ili meritas.“ kaj la faktoj pravigas lin. La plena manko de interesigo flanke de la E-istoj kompreneble seniluziige efikas al AVRO. Ne mirige do ke tuj post la kongreso la pordo de la AVRO-studio hermetike fermiĝos antaŭ nia nazo. Sed se vi reagis, dormantaj ges-anoj, bonvolu reagi prudente kaj ne stulte! Ne sendu bildkartojn de Zamenhof kun subskribo: „Ni adoras la Majstron“, ne sendu glumark-kovritajn kovertojn kaj ne skribu „Vivon Esperanto!“ por indiki vian deziron ke Esperanto longe vivu. Ne distrumpetu ke vi estas vegetarano aŭ sentabakulo, ĉar tio ja neniel koncernas vian esperantistecon. Mal-longe, se vi ne deziras ridindigi nian movadon prefere rezignu pri reago kaj lasu tiun taskon al kompetentuloj aŭ al via sekcia estaro.

G. RUMBLULO.

**Raporto Jarkunveno LEEN**

(daŭrigo)

S-ro P. M. Mabe-soone poste klarigas la proponon de la ĉefestraro eldoni nian gazeton en kunlaboro ne nur kun F.I.L.E. sed ankaŭ kun R.B.L.E. kaj S.E.S. La aliaj asocioj jam aprobis la proponon kaj preferas la duonan formaton kun duobla paĝonombro. La jarkunveno aprobas la proponon. S-ro H. Arends (Arnhem) demandas, ĉu ĉiu asocio havos apartan paĝon redaktotan de la landa redaktoro; kiel eblis, ke F.I.L.E. jam antaŭ sia kongreso aprobis la proponon kaj kiom da jaroj validos la kontrakto.

Lian unuan demandon s-ro P. M. Mabe-soone respondas jese. En Flandrujo la estraro decidis pri tiaj aferoj kaj ne la jarkunveno kiel ĉe ni. La kontrakto estos dujara. S-ro H. Oosthoek demandas, ĉu eblas akcepti komercajn anoncojn. S-ro P. M. Mabe-soone jese respondas.

La propono de la ĉefestraro pri la nunjara membrototizo, la kotizo de la donacantoj kaj la abonprezo de „N.E.“ estas aprobata.

Ĉe la pritrakto de la buĝeto s-ro H. A. rendis petas klarigon pri la propaganda kazo. Ĉu ni elspezis pli ol kutime por la kongreso en Antwerpen kaj ĉu L.E.E.N. ricevis parton de la profito? La ĝen. kasisisto respondas, ke por ebligi al la sekcioj sendi delegitojn al tiu kongreso, ni siatempe decidis aldone disponigi el la propaganda kaso sumon egalan al tiu, kiun la asocia kaso repagas laŭ par. 36 de nia regularo. Laŭ la interkonsento la asocio en la lando kie la komuna kongreso okazas, havas la financon riskon. La buĝeto estas sensanĝefiksata.

La prezidanto laŭlegas proponon de sekcio Merkuro kaj la opinion de la ĉefestraro. Ĝi temas pri la demando, ĉu L.E.E.N. povas akcepti grupojn kun religia aŭ politika tendenco. S-ro J. Th. de Goey (Merkuro) petas la jarkunvenon bone pripensi la aferon. Se oni akceptos tian grupon, oni poste ne povos malakcepti aliajn. Merkuro timas, ke L.E.E.N. perdos sian neŭtralan karakteron, akceptante tendencajn grupojn. La komparo kun U.E.A. ne estas tute ĝusta, ĉar la fakaj asocioj, aliĝintaj al U.E.A., ne havas voĉdonrajton. S-ro H. Arends demandas, ĉu la ĉefestraro antaŭe interkonsiliĝis kun la sekcioj en R'dam. S-ro J. V. Holleman (Groningen) diras, ke lia sekcio funde pritraktis la aferon kaj konkludis, ke por la bono de Esperanto ni akceptu ankaŭ tendencajn sekciojn, se ilia regularo estas konforma al tiu de L.E.E.N. La prezidanto diras, ke laŭ la ĉefestraro, en L.E.E.N. estas loko por ĉiu individuo kaj grupo kiu pretas submeti sin al ĝiaj statuto kaj regularo. Antaŭa interkonsiliĝo ne okazis kaj pro tio la ĉefestraro jam pardonpetis al la R'damaj sekcioj, kiuj komprenis, ke ĉiu, eĉ ĉefestrarano, povas forgesi ion. S-ro J. Th. de Goey refoje atentigas, ke Merkuro volas konservi la neŭtralecon de L.E.E.N. La voĉdonado montras, ke la L.E.E.N.-anaro ne timas perdi tiun neŭtralecon, ĉar ĝi subtenas la opinion de la ĉefestraro per 37 kontraŭ 3 voĉoj.

La propono de sekcio Amsterdam, ke la sekcioj kune donacu g. 100,— al la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj ke la ĉefestraro aldonu g. 100,— el la asocia kaso, estas ĉiuvoĉe akceptata kun la amendo de la ĉefestraro, laŭ kiu sekcioj, kiuj jam libervole donacis ion, rajtas depreni la jam donacitan sumon de la laŭ la propono de A'dam por ili fiksa kvoto.

Kvankam oni en antaŭaj jarkunvenoj jam kelkfoje esprimis la deziron, ke la membroj kiel eble plej multe subtenu la libroservon de L.E.E.N., montriĝis, ke pri ĝi ankoraŭ regas kelkaj eraraj opinioj kaj ke la novaj anoj ne sufiĉe estas informitaj. Pro tio la ĉefestraro sur la dorsa flanko

# Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

**Prezidanto:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.  
**Sekretario:** Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).  
**Kasistino:** F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.  
**Biblioteko:** E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)  
**U.E.A. peranto:** Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.  
**Redakcio F.E.:** Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)  
**Koresponda kurso:** A. Nysstraat 37, Anderlecht

## TAGORDO DE LA GENERALA JARKUNVENO dum la kongreso

1. Malfermo
2. Salutoj
3. Priparolado de la sekretaria raporto
4. Statutsanĝoj poŝonitaj de la estraro kaj de sekcioj Mechelen kaj Brugge
5. UEA-agado en nia teritorio
6. Komuna rezolucio
7. Diversaĵoj

## TAGORDO DE LA ESTRARKUNVENO Sabato 5.6.54 en Lieĝo, je la 17 h.

1. Malfermo
2. Financa situacio
3. Komunaj gazetoj
4. 25-jara ekzistado de FL.L.E.: eventualaj efektivaĵoj (1955)
5. Diversaĵoj

## STATUTSANGOJ

### Art. 21 de la organiza regularo:

ALDONO: Een bestuurslid dat drie maal na elkaar afwezig is op de bestuursvergaderingen, kan door het bestuur als ontslagnemend aangezien worden (Proponita de la estraro).

### Art. 20 de la organiza regularo:

ALDONO: . . . tenzij uitzonderlijke gevallen, waarover de meerderheid van het bestuur beslist. (Proponita de sekcio Mechelen por ebligi al Dro Van Gindertaelen igi alektita administranto de R.B.L.E. La estraro konsentas kun tiu propono).

### Art. 9 de la organiza regularo:

ALDONO: De afgevaardigden der afdelingen en de plaatselijke vertegenwoordigers die op een Algemene jaarvergadering tegenwoordig zijn, mogen van de Bond de terugbetaling van hun reiskosten (laagste tarief) vorderen. (Proponita de sekcio Brugge; ne ankoraŭ

de la tagordo klarigis la celon kaj funkciadon de la servo. La ĉefestraro petas la delegitojn pritrakti la klarigon, pri kiu neniu havas rimarkojn aŭ kritikon, en la sekcijaj kunvenoj.

La kunveno ĉiuvoĉe elektas f-ino A. Laverman kiel ĉefestraraninon por la norda distrikto kaj reelektas s-on A. J. Kalma kiel ĝen. sekretarion.

La jarkunveno petas sekcion Amsterdam elekti kaskontrolontojn kaj sekcion Utrecht, elekti kontrolontojn por la biblioteko.

La jarkunveno laŭ sugesto de la ĉefes-

priparolita en estrarkunveno. La propono estas tamen aprobinda, por plialtigi la partoprenadon de la gemembroj en la aktiva laboro de nia asocio. La financa situacio eble permesos la efektivigon por la jarkunveno fino de la jaro 1954).

## PREMIJOJ POR ENLOGANTOJ

Sinjorino F. Roose elektis „La nevenkebla ĝeno“, kaj ni do lasas la elekton al F-ino N. Van Gindertaelen inter la sekvantaj libroj:

PINOKJO, de C. Collodi (tradukita de M. Marchesi)

MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO, de Agatha Christie (trad. de Etolu).

Post la elekto ni sendos al S-ino Volders - Van der Mast la restantan verkon.

## PLAATSSELIJK NIEUWS

Brugge: Onze voorbeeldige leden de heer en Mevrouw Marechal-Roose, mochten zich verheugen in de geboorte van een dochttertje. Mocht Catharine in de toekomst met dezelfde ijver werken voor het wereld hulptaalidee als haar ouders, dit de Beweging en onze Vereniging ten bate.

Utrecht. La utrechta sekcio havas nun novan estraron konsistantan el la jenaj personoj: Prez. S-ro G. H. Koudijs, Paulus Potterstraat 16. Sekr. S-ro F. Hoekstra, Balyelaan 46 bis. Kasino S-ino P. C. Boll, Herman Stafflevenstr. 23. Ĉiuj en Utrecht.

La antaŭa estraro jam delonge esprimis la deziron eklogi pro aĝo kaj multokupiteco. La nova estraro esperas per energia propagando, varbado kaj per la helpo de ĉiuj membroj eltiri la grupon el la malfavora stato en kiu ĝi post la dua mondmilito troviĝis.

traro petas sekcion Utrecht esplori, ĉu la jubilea kongreso de L.E.E.N. en 1955 povos okazi en Utrecht, kie L.E.E.N. estis fondata en 1905. Kiel kutime tiu kongreso (denove „Beneluksa“) okazos je Pentekosto.

Libera diskutado: S-ro E. de Wolf (Haarlem) petas sendi prunte flagojn al Haarlem por la U.K. S-ro J. V. Holleman esprimas la ĉagreniĝon de sekcio Groningen, ĉar en la U.K. ne estos aŭdigata la kantato de s-ro Frieso Moolenaar.

(Finota)

## DAKTILOSKOPIO I

Kiam kelkaj legantoj petis al la redakcio artikolon pri la fingraj postsignoj en ilia rilato kun la identigo de krimuloj, mi unue intencis mem verki tekston, post konsulto de la utilaj fontoj. Tamen, leginte la interesan libron „Manuel de Dactyloscopie” de Th. Bergerhoff, mi konsideris tiun taskon superflua ĉar la unuaj paĝoj de tiu libro liveris klaran, kompletan disvolvon pri tiu temo... kaj mi do simple tradukis, iam adaptante la materialon al mia celo.

Mi nur deziras aldoni kelkajn lingvajn notojn, ĉar ŝajnis al mi nepre necese uzi, por kelkaj teknikaj terminoj, t.n. neologismojn, kies senco ja evidentiĝas ĉe la legado mem, escepte eble de **Justico**, vorto kiu en mia koncepto celas la funkciojn kaj organojn kiuj intervenas por pritrakti procesojn civilajn aŭ kriminalajn, do ekde la esploro, post plenumo de krimo aŭ delikto, ĝis la kondamno kaj efektiva plenumo de tiu kondamno.

La vortoj polmo, papilo, hiromancio hiromanciisto estas internacie konataj kaj do ne postulas klarigon.

Hedero.

### Enkonduko

La identeco de estajo estas ĝia propreco esti kio ĝi estas kaj ne alia estajo. Nia identeco do ekzistas ekde nia ekesto ĉe la gravedigo kaj ĝi malaperas nur okaze de nia neniigo. Ĝi neniam povas aparteni al iu alia kaj ni ne povas ŝanĝi ĝin.

Rilate al la Naturo, nia identeco estas figurata per niaj materialaj, moralaj kaj intelektaj kvalitoj. Iuj el ĉi tiuj ŝanĝiĝas en nia ekzistado, sed ili malgraŭe konsistigas tuton kiu daŭras, kiu restas sama de la komenco de nia vivo ĝis ĝia finiĝo, tuton sen duoblo, specifan tuton kiun ni nomas nia **natura identeco**.

Rilate al la Socio, ies identeco estas en ĉiuj landoj reprezentata per lia nomo. Sed en gravaj komunoj sama nomo povas aparteni al diversaj personoj, indiki diversajn identecojn. Tial oni ĝenerale, en civilizitaj landoj kaj tio por eviti konfuzojn, kompletigas la nomon per la antaŭnomoj, la naskiĝloko kaj -dato, la nomoj de la gepatroj kaj eventuale aliaj informoj. Tiel oni formas tuton kiu, kvankam ne same specifa kiel la natura identeco, tamen sufiĉas por individuigi iun. Ni nomas tiun tuton, kutime indikatan per la esprimo „identec-informoj”, la **civila aŭ socia identeco**.

Difini ies identecon aŭ identigi lin estas rilatigi lian socian identecon kun lia natura identeco, estas trovi kiun socian identecon korespondas kun donita natura identeco. Ordinare, volante koni ies civilan identecon, oni demandas pri ĝi kaj li memvole konigas ĝin. Alie oni esploras liajn paperojn, legitimilon, pasporton, k.t.p. Sed estas

amneziuloj kaj frenezuloj kiuj ne kapablas diri sian identecon kaj kiuj malhavas la paperojn **ad hoc**. Estas precipe personoj por kiuj la kaŝo de la identeco gravas kaj kiuj rifuzas konigi ĝin. Tre ofte ili deklaras identecon neekzistantan aŭ uzurpitan kaj, por pravigi siajn asertojn montras dokumentojn kiuj ŝajnas perfekte en ordo sed kiuj ne estas aplikeblaj al ili. Ĉu Bertillon iam ne skribis ke la misfaruloj plej ofte posedas la plej belajn paperojn?

La celo de la identigaj metodoj estas senmaskigi la trompistojn aŭ, escepte, maskovri la identecon de amneziulo, de frenezulo aŭ de kadavro. Aktuale ekzistas tiucele en la tuta mondo identigaj servoj. Preskaŭ ĉiuj estas justicaj servoj, ĉar estas evidente ke la individuoj al kiuj nepre gravas la kaŝo de la vera nomo, estas tiuj kiujn aludis Bertillon, nome la krimuloj kaj la deliktuloj, precipe se ili estas re-kulpuloj aŭ se la Justico serĉas ilin. La koncernaj servoj baziĝas ĉiuj, escepte de maloftaj, sur la daktiloskopia. Tiu ĉi ebligas ne nur identigi iun kiu ne volas aŭ ne povas konigi sian veran nomon; ĝi ankaŭ permesas determini kiu estas la aŭtoro de krimo aŭ delikto, kiam tiu misfarulo surloke postlasis identigeblajn papilajn postsignojn.

### § I. — Ĝeneralaj nocioj.

La vorto **Daktiloskopia**, elpensita de argentina kuracisto, d-ro Francisco Latzina, devenas de du grekaj vortoj **daktylos** (fingroj) kaj **skopein** (ekzameni). La objekto de la daktiloskopia estas do la studo de la fingroj aŭ, pli ĝuste, de la desegnaĵoj sur la polmo de la fingro kaj, en pli vasta senco, de la desegnaĵoj kiuj ornamas la tutan polmon de la mano kaj la tutan plandon de la piedo. Ĝia celo estas la identigo de la homo per tiuj desegnaĵoj.

La diritaj supraĵoj estas trairataj per tri specoj de enpremoj:

1e. La **fleksfaldoj** inter la diversaj falangoj, inter la fingro kaj la manpolmo, inter la piedfingroj kaj ties plando fine tra la plando kaj la polmo. Ĉi tiuj kavaĵoj estas tiuj kiujn la hiromanciistoj nomas la manlinioj, t.e. la vivlinio, la kaplinio, la korlino k.t.p.

2e. La **blankaj linioj**, haŭtsulkaj malpli larĝaj ol la faldoj, tre abundaj ĉe iuj, tre maloftaj aŭ eĉ mankantaj ĉe aliaj, disvolviĝantaj kaj pliiĝantaj laŭ la aĝo sed iam ekzistantaj ĉe tutjunaj infanoj, jen vertikalaj, jen horizontalaj, jen oblikvaj, traŝanĝantaj unuj la aliajn, modifiĝantaj en la vivo, apearantaj aŭ malaperantaj. Iuj konsideris ilin kiel faltojn: aliaj asertas ke ne estas faltoj. Oni fine nomis ilin blankaj linioj.

3e. La **interpapilaj sulketoj**, ankoraŭ pli mallarĝaj ol la antaŭaj kaj kiuj estas la

interspacoj disigantaj la **papilkrestojn**.

La **papilkrestoj** estas mikrokospaj montecenoj, kiujn la nuda okulo pene perceptas; ili estas ekstreme multnombraj, mirinde regulaj kaj mirige fiksj. Ili neniam modifiĝas. Ili ĝenerale estas paralelaj, sed ili refaldiĝas, turniĝas kaj konsistigas grupojn, oponajn unuj al la aliaj. Ili ŝuldas sian ekziston al etetaj pintoj, kiuj radikas profunde en la dermo kaj nomitaj **papiloj**. Tial la nomo **papilkrestoj**, **interpapilaj sulketoj**. La papiloj nombras de unu ĝis kvin pintoj kaj, envere, la papila sulko ne trairas du najbarajn papilojn sed du pintojn de sama papilo. Inter iuj papilojn penetras la ŝvitkanalo, kiu kondukas al la haŭtsupro la substancojn, sekreciitajn per la ŝvitglando, situanta profunde en la dermo. La papilkresto do iel konsistas el du serioj da duonpapiloj, kunigitaj per epiderma parto kaj sur ĝia pintaro dissemiĝas la poroj. Tial la misfarulo iam lasas sur la loko de la krimo aŭ de la delikto latentajn postsignojn.

La papilkrestoj kune formas la **papilajn desegnaĵojn**, inter kiuj oni distingas la **fingrajn**, la **polmajn** kaj la **plandajn desegnaĵojn**. Tiuj desegnaĵoj estas precipe karakterizaj sur la tria falango de la fingro, alivorte sur la falangeto, kiu portas la unĝon; la esprimo „fingraj desegnaĵoj” kutime indikas la desegnaĵojn de la solaj falangetoj. La reproduktoj de la papilaj desegnaĵoj, akiritaj per premo, nomiĝas **papilaj premsignoj**, kiuj kompreneble dividiĝas en **polmaj**, **plandaj** kaj **fingraj premsignoj**; aŭ **daktilogramoj**. Per la vortoj „fingraj premsigno” aŭ „daktilogramo” oni precipe celas la premsignon de la falangeto.

### § 2. — Proprecoj de la papilaj desegnaĵoj.

La papilaj desegnaĵoj posedas la sekvan-tajn proprecojn, kiuj igas ilin bonegaj identigiloj:

1o. Ili restas senŝanĝaj ekde la unuaj monatoj de la enutera vivo ĝis la putriĝo de la haŭthistoj.

2o. Ili restas neŝanĝeblaj t.e. oni ne povas anstataŭi ilin per samspecaj ŝanĝitaj desegnaĵoj.

3o. Ili diferencas de persono al persono, de fingro al fingro; sur la tuta tero oni ne povas trovi du diversajn fingrojn kiuj povas produkti premsignojn ĉiel samajn.

4o. Ili estas klasifikeblaj.

El tio rezultas:

1o. Kiam oni posedas la papilajn premsignojn de individuo, ĉi tiu vane provos ŝanĝi sian nomon; sufiĉas preni liajn premsignojn kaj kompari ilin kun la daktiloskopia slipo pro aserti ke temas pri ja sama individuo kaj ne pri du diversaj.

2o. Ke kolekto da identigaj slipoj povas esti metode klasifikita per la nuraj premsignoj kaj ke, kiel en la kazo supre konsiderita, la nova slipo ebligas retrovi la malnovan sen alia gvidilo ol la klasifikformulo,



liverita de la tipo kaj iuj aliaj elementoj de la premsignoj.

### § 3. — Fingraj premsignoj.

La papilaj desegnaĵoj plej facile klasifikeblaj estas tiuj de la falangetoj, la fingraj desegnaĵoj. Ili ankaŭ estas la plej facile identigeblaj kaj reprodukteblaj. Ili okupas — tio estas, memkomprenebla — malpli da loko sur dokumento ol la polmaj premsignoj. Fine, sur la loko de krimoj aŭ de deliktoj oni renkontas precipe fingrajn premsignojn. Ĉu do mirige ke ili ludas la ĉefrolon? La determino de la identeco de arestitoj baziĝas, kiom intervenas la daktiloskopia, nur sur ili. La ordinarnaj daktiloskopiaj slipoj surhavas nur la fingrajn premsignojn. La daktiloskopiaj registroj estas, escepte de kelkaj kolektoj da polmaj premsignoj por la identigo de surlokaj polmaj spuroj, kolektoj da daktilogramoj.

Notu ke ekzistas du specoj de fingraj premsignoj, aŭ pli ĝuste, de papilaj premsignoj:

1o. Tiuj, kiujn oni nevole estigas, kiam oni tuŝas suprajon ebenan, precipe poluritan aŭ plastikan, t.e. la **papilaj spuroj**.

2o. Tiuj, kiujn la daktiloskopiisto intence prenas por identigi la rekulpulojn aŭ kompari ilin kun la unuaj. Preskaŭ ĉiam oni prenas ilin per pres-inko kaj oni nomas ilin **idealaj** aŭ, tutsimple, **inkaj premsignoj**.

### § 4. — Daktiloskopiaj slipoj.

Ili estas la dokumentoj kiujn la identigaj servoj kolektas unuflanke por ebligi la identigon de rekulpuloj kiuj deklaras falsan nomon, aliflanke por determini kiuj estas la aŭtoroj de postlasitaj papilaj spuroj.

Estas du specoj de daktiloskopiaj slipoj, la dekfingraj kaj la unufingraj.

La dekfingraj slipoj surhavas la ink-rulitajn premsignojn de la dek fingroj. La rulitaj premsignoj necesas, unuflanke ĉar ili reproduktas tiel komplete kiel eble la papilajn desegnaĵojn de la falangetoj, aliflanke ĉar sole ili prezentas, koncerne iujn fingrojn la triangulojn aŭ deltojn, kiuj estas nemalhaveblaj por klasifiki la daktilogramojn. La plimulto el la dekfingraj slipoj krome surhavas la samtempajn nerulitajn premsignojn de pluraj fingroj. Ili ebligas kontroli ĉu la rulitaj estas faritaj en la dezirata sinsekvo.

Ekzistas diversformataj dekfingraj slipoj. La belga slipo simila al la modeloj angla, nederlanda, germana ktp. estas granda fleksibla folio kun, sur du paralelaj vicoj, la dek rulitaj premsignoj kaj sube de ĉi tiuj, la nerulitaj de la kvar longaj fingroj de ambaŭ manoj. Ĝi krome surhavas la formulon de daktiloskopia klasifiko, resuman personpriskribon, la indikon de rekonmarkoj, la identigajn informojn, la kialon de la enkarcerigo kaj la subskribon de la deliktulo. La teksto de la porvira slipo estas

(Legu plu kol. 2)

## TRA LA VERDA MONDO!

### INTERNACIA KONKURSO

Premio de 25 us. Dolaroj!

La Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio, loka Filio de la tutlanda E-Asocio de Nord-Ameriko, donos premion de 25 dolaroj al la gajninto en tutmonda konkurso pri skribita tezo „Kial la Unuigitaj Nacioj bezonas Esperanton.“ La premion gajnos, kiu verkos la plej bonan leteron pri la supra temo.

La leteroj estu maksimume 500-vortaj kaj en Usono antaŭ 15.9.54 ĉe: Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio, 448 South Orange Ave, Newark 3, N. J., U.S.A.

### F-ino M. Noll, 80-jara

La Patrino de la Dana Esperanto-Movado Margrethe-Caroline Noll, fariĝis 80-jara la 22-an de Majo; asertante ke Esperanto konservas junecon, ŝi ankoraŭ aktive partoprenas la E. movadon, kvankam ŝi jam en 1907 fariĝis Esperantistino. Niajn korajn gratulojn!

### Esperantoplaco en Gotenburgo

La urba konsilantaro de Gotenburgo, la dua urbo de Svedujo, decidis doni la nomon ESPERANTOPLACO al baldaŭ nov-aranĝota placo en la mezo de la urbo. Tiamaniere Svedujo la unuan fojon ricevis Esperantoplaceton dank' al energia laboro de la gotenburgaj gesamideanoj.

### Aŭstra Kongreso

Aŭstra Jubileo E.-Kongreso estos organizata okaze de la 50-jara ekzistado de la Aŭstra E.-movado, le 5-8/6/54 en Vieno. Aperos speciala Aŭstra poŝtmarko. Ĉeestos multaj oficialuloj. La partopreno de diversaj eksterlandaj E-istoj estas atendata. Adreso: L.K.K. Wien XI. Fünfhausgasse, 16, (Aŭstr.).

negre presita, tiu de la porvirina, ruĝe.

La belga unufingra slipo, en kartono, surhavas unu rulitan premsignon kaj unu nerulitan, la indikon de la fingro kiu produktis tiujn daktilogramojn, la klasifikan formulon kaj la informojn por trovi la koncernaton de la slipoj.

La dekfingraj slipoj estas ĉefe uzataj por rekonni la rekulpulojn, nur dualoke por identigi fingrajn premsignojn; la unufingraj estas uzataj nur por la lasta celo.

En maloftaj landoj ekzistas tria modelo de daktiloskopia slipo aŭ pli ĝuste hiroskopia, surhavanta la du polmajn premsignojn. Ĝi servas ekskluzive por identigi la polmajn premsignojn, surloke trovitajn.

### Sveda UNESKO-konsilantaro invitas al Frostvallen

Sveda Instituto por kultura interŝanĝo kun eksterlando kaj Sveda UNESKO-konsilantaro invitas al la altnivela prelegsemajno en Frostvallen. Aranĝos Sveda Esperanto-Instituto, kaj inter la gravaj traktotaj problemoj ekzistas prefere serio pri la Eŭropa Konsilantaro, kiu nun same kiel UNESKO traktos la demandon pri la lingvaj problemoj. La prelegoj okazos 8-15 aŭg., kaj Frostvallen situas apud Malmö en la suda parto de Svedujo.

### Jubileo 1955

En tiu jaro festos sian 50-jaran jubileon: la Nederlanda „La Estonto estas nia“, „Reĝa Belga Ligo Esperantista“ kaj ankaŭ la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko. En la sama jaro ekzistos 25 jarojn: Flandra Ligo Esperantista.

### Alvoko al honora konkurso

Konvena propono pri belarta statuo, kiu dekoru novan „Esperantoplaco“ en la sveda hav urbo Gotenburgo, estas serĉata. La placo, la unua en Skandinavio, situas en moderna kaj vigle trafikata urboparto.

Per tiu ĉi alvoko ni turnas nin al ĉiu kapabla artdesegnisto kaj skulptisto petante pri helpo. Helpu nin per viaj ideo, sugestoj aŭ pozitivaj projektoj kiel eble plej efektive ornamu tiun placon.

La statuto esence simboligu la universalecon de Esperanto, sed ankaŭ estu alloga el estetika vidpunkto.

La tuta materialo estos ekspozicie prezentata kaj de fakuloj juĝata. La venkinta projekto por ĉiam honoros la artiston.

Por ke ankaŭ neeŭropanoj povu partopreni ni etendigas la konkurstempojn ĝis la fino de decembro 1954.

La materialo estu sendata al: Esperanto-Statuo, Box 11035, Göteborg 11, Svedlando.

### Esperantista ferio en Bela Svislando

La Popola Altlernejo de Bern disponigas al la Esperantistaro sian komfortan kastelon Münchenwiler apud Murten por la aranĝo de Esperanta semajno de la 23a ĝis 29a de aŭgusto. La kastelo apartenas al la ŝtato. Signifas grandan favoron kaj bonŝancon, ke ĝi estos malfermita por tia internacia kurso. Pri la organizo respondecas Svisa Esperanto-Societo. La programo antaŭvidas perfektigan kurson kaj prelegojn de la plej konataj svisaj Esperantistoj, krome multajn ekskursojn.

Münchenwiler situas en la laga regiono de meza Svislando; Bern, Fribourg kaj Neuchâtel estas facile atingeblaj de tie. Petu la ilustritan prospekton ĉe: Svisa Espero, Hangweg 57, Liebefeld- Bern.

## NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris psst n-roj 167/168 : f-ino S. Popelier, Blankenberge, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: F-ino J. J. Thiel, el Amsterdam

### SOLVOJ.

169. Pupil, okul, suker, tuber, satan, ulan, fazan, etaĝer, retin, ordin, vesper, eman, nomad, altan, societ, paper, ripar, omar, sonet, parter, ekzempler, ripet, ovul. Post sufero venas prospero.

170. Vind; or; loti; prav; rem; alte; ski; for; ist; bel; bu; art; er; etulin; re; lip; etul; dir;flug; il; help; masko; bal; kupra; akord; inversig; pulio; kling.

### 171. KRUCVORTENIGMO.

*Horizontale.* 2. havi efikon(R); sovaĝa besto(R). 3. fari kavajon en tero(R). 4. tro trinkinta; politika reĝimo uzanta kruelecon(R). 5. prefikso; rita vesto uzata por Diservo(R); pers. pronomo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

### Anoncetoj

Dezirias korespondi kaj interŝanĝi p.k. Miroslav Hanačik, Skodova, 7, Prerov, Ĉeĥoslovakujo.

Esperanto-vegetaranoj en Izraelo intencas renovigi la revuon „Vegetarano”. Interesuloj skribu al Zamenhof-Fondo, Jerusalema p.k. 804.

Chuko-Yu, ve „Sun-Gain-Sha”, Tenroku, Hankyn Building no 5-6 Chome-Tenjinbashi, Oyodo-ku, Osaka, Japan, serĉas kontakton kun Nederlanda Espisto por ke ĉi tiu informu lin pri nederlandaj problemoj (politikaj, ekonomiaj, sociaj, kulturaj, sportaj, k.s.). Ne necesas profesiulo. Kompenso sub diversaj formoj ebla. Interesato turnu sin al mi, baldaŭ!

Dezirias korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi belajn p.k.: Vrana Milan, Prerov. Partyzanska 158, Ĉeĥoslovakujo.

Francaj edukistoj aranĝos en la somero 1955-a konkurson kies premioj estos unusemajna restado ĉe fremdlandano.

6. ili dispartigas frazon(R); nove oficialigita sufikso(R). 7. esti ravita per ia beleco(R). 8. malsano(R); senparola(R). 9. komplete(R). 10. brilligi per frotado(R); intence ne atenti(R).

*Vertikale.* 1. nombro(R); ĥimero(R). 2. birdo havas ĝin(R). 3. disponigi ion ne petitan(R); trompe ŝanĝi(R). 4. Adjektivo montranta neprecizan malgrandan kvanton. 5. akva floro(R); pereigi(R). 7. konforma kun la juro; nepublika(R). 8. facile vaporiganta fluaĵo(R). 9. molusko(R); ridinda kutimo(R). 10. akvomaso(R). 11. eligi sekan bruon de frotado; kuŝigi(R).

### 172. PROVERBENIGMO.

Reordigu la litergrupojn, tiel ke ili nunu proverbon.

1. ain, enc, ino, kli, kom, noda, sĝi, slaf, ŭra.

2. ezo, kib, nĉa, nek, nos, raĉ, rin, rvit, uenp, uto.

3. ajb, aro, ase, ins, nin, oki, rar, rasn, tru, unfa.

4. aro, edm, emo, ion, ivo, las, lass, men, omv, ruk, sog, uki, vip.

5. ann, dia, eat, eda, efo, end, hie, neb, raŭ, rga, rlas, uho, umo, ŭan, ŭann, ŭru.

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.L.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ 20/VI/1954.

Esperantistoj, kiuj pretos akcepti francan samideanon kaj rekompence mem deziras senpage loĝi unu semajnon ĉe franca samideano, skribu al s-ino Klodja, Ecole Rilla, Fougères (I & V), France.

La seminaria kurso por Cseh - metodoj Instruistoj definitive okazos de 29/7—31/7 sub rektoreco de s-ro J. v. d. Meulen, direktoro de la Stata Instruista Seminario en Haarlem. Kursgvidanto: s-ro ANDREO CSEH. La lecionoj okazos matene 10—13 h, kaj posttagmeze 15—18 h, en „Rijks-kweekschool voor Onderwijzers”, Leidsevaart 220, Haarlem.

La vesperoj estos liberaj.

Aliĝoj kaj informoj: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag. Kurskotizo gld. 6,—; por du personoj de unu familio gld. 10,—.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).

### Novaj prospektoj

En la lasta tempo ni denove ricevis plurajn belajn turismajn prospektojn en Esperanto. La urbo Nürnberg aldonis al sia riĉa ilustrita prospekto kvar presitajn enkrampitajn paĝojn en Esperanto kaj krome ĝi publikigis pli simplan faldprospekton nur en Esperanto. Stuttgart eldonis malgrandan sed tre plaĉan kvarpaĝan prospekton en Esperanto, haveblan: Verkehrsburö, Bahnhofplatz 1. Ankaŭ la tripaĝa prospekto de Frislando, la plej norda provinco de Nederlando, estas tre plaĉa, ĝi estas havebla ĉe V.V.V. domo, Stationsplein, Leeuwarden. La foiro de Padova en Italujo jam de kelkaj jaroj utiligas Esperanton; ĉi-jare ĝi eldonis aparte belan prospekton dukoloran, kiu eĉ estas ornamita per la verda stelo. Oni povas mendi ĝin ĉe Foiro de Padova, Via N. Tommaseo 59, Padova. Ankoraŭ ni volas menciigi la urbon de Konstanz, kiu presigis kvarpaĝan prospekton pri Konstanz en Esperanto aidonenda al ĝia multkolora bildprospekto. Konstanz bonvenigis jam plurfoje Esperantajn renkontojn kaj ankaŭ ĉi-jare invitas al kunveno. Kvarpaĝa kaj bele ilustrita estas la prospekto eldonita de la Svisa Esperanto-Societo pri la ferio-kurso en Münchenwiler, kiu okazos en la lasta semajno de aŭgusto.

Okaze de la 700 jara ekzisto de la fromaĝurbo Alkmaar aperis faldfolio, kun kelklinia teksto (bedaŭrinde nekontrolita) en Esperanto. Aperis faldfolio pri Zandvoort kaj il. informilo de N.Z.H.V.M., kiu i.a. enhavas detalojn pri la tutsemajnaj abonkartoj je reduktita tarifo, kiuj validas nur por partprenontoj en la „39-a”. „Rederij Kooy”, kiu prizorgas la ŝipekskursojn tra la kanaloj kaj havenoj de Amsterdam, presigis E-lingvan prospekton.

### Hellsingör (Danl.) invitas vin.

De 17-24 de Julio kiel ĉi-jare okazos en la tiea internacia aliternejo la feria kurs-semajno. Kursoj gvidotaj de S-ino Zacho (daŭriga k.), F-ino Ida Kristensen (konversacia k.); S-ro Morariu (prepara por E.gvidantoj), S-roj Stop — Bowitz kaj Rosbach (k. por E.gvidantoj); S-ro Moravec (Infankurso). Kostoj por ĉio de 115 ĝis 155 D. Kr. Skribu al S-ro L. Friis, Ingemannsvej, 9, Aabyhoj (Danl.)

La vojaĝo de Nederlanda karavano tien kaj anoncita en F.E.-N.E. de Aprilo, ne okazos ĉar la ĝisnuna intereso ne estas sufiĉe granda.

Oni ne plu skribu pri ĝi al: S-ino Feitsma-Edzers, Grachtstraat 9, Winschoten (Ned.)